

Argentina E-Vento

Oficiala organo de Argentina Esperanto-Ligo
12-a jaro n-ro 29

Aprilo 2007 [1]

Turismo en Argentino



Vizito al Neuquén

Antaŭ nelonge, du junaj esperantistoj el Bonaero (Bernabé kaj Christian) vizitis la urbon *Neuquén*, kaj kompreneble, kontaktis la etan lokan E-rondon. Dum la neformala kunveno ili parolis pri la nuna stato de la E-movado en Argentino. Surfote aperas, de maldekstre dekten: Martín Vincenzini; Livia Barth, aktiva membro de la Rondo; Bernabé; Cecilia Prudkin; Rubén Sánchez kaj Christian.

Rubén Sánchez

Argentina E-Vento

12-a jaro n-ro 29 Aprilo 2007 [1]

Oficiala organo de Argentina Esperanto-Ligo

[Argentina Esperantisto 1917-1995]

Aperas kvaronjare/Trimestral

Dissendita al 29 landoj - Interŝanĝo dezirata

Redaktoro - ekde 1996-

Rubén T. Diaconu Tkachenco

Calles 119 y 122

AR-H3700FTT Pres. R. Sáenz Peña

Argentino

rubendiaconu@yahoo.com.ar

Kunlaborantoj:

Rubén Sánchez: esperanto@neunet.com.ar

Nicolás Murano: nico@esperanto.org.ar

Pri la subskribitaj artikoloj respondecas iliaj aŭtoroj kaj ili ne nepre reflektas la opinion de AEL aŭ de la redaktoro.

Argentina Esperanto-Ligo

Fondita la 12-an de aprilo 1941

Re-fondita surbaze de AEL-AEA

la 9-an de decembro 1995

TTT-ejo: www.esperanto.org.ar

AEL-Estraro

Alcides Wentinck – *prezidanto*

René Arce – *vicprezidanto*

Jorge E. Cabrera – *sekretario*

Fernando Inocencio – *vicsekretario*

Mario J. Miranda – *kasisto*

José Dioguardi – *vickasisto*

Komisiitoj

Instruado – Teresita Alaniz

Libroservo – Mario J. Miranda

Disvastigado – Silvia Rottenberg

Arhivo – Roberto Sartor

UEA Komitatano – Marcelo Casartelli

Ĉef-delegito – Rubén L. Sánchez

Kotizperanto – Mario J. Miranda

Argent-EJO – Daniel M. Lucero

Se vi deziras kunlabori por la eldono kaj dissendo de ĉi tiu revuo, vian monkontribuon estos bonvena. Vd. p. 15

Enhavo

Turismo en Argentino

El la Redaktejo..... 2

Análisis / Noticias /

Hispanlingva rubriko..... 3

Tra la lando..... 5

Esperantaj spertoj..... 6

Amerike..... 11

Distraĵo..... 12

Poemoj..... 13

Internacie..... 14

Anoncoj..... 15

El la Redaktejo

Karaj legantoj:

Kun granda ĝojo ni komencas travivi novan jaron 2007 kaj plenaj da aktivaĵoj. Espereble pere de Argentina E-Vento oni povos respreguli ĉiujn ilin kaj ĝi estu plaĉaj al vi. Tamen ni memorigas, ke ĉiam oni atendas viajn kontribuojn, informojn, raportojn, interesajn artikolojn, aŭ simple, viajn reagojn. Bonan legadon!

Via redaktoro

Novedades del esperanto y su entorno

AEL y diversas actividades del esperanto han sido reflejados en medios de comunicación de nuestro país y del exterior.

Visitas

Hester Guiot de Bourlot volvió a visitar este año, como ya es habitual, nuestro país. La Sra. Hester es una docente y esperantista italiana y durante sus viajes de vacaciones ha desarrollado cursos de esperanto en la provincia de Entre Ríos ayudando a formar grupos en Colón, Villa Elisa y Villa San José.

Aneta Ubik, después de sus vacaciones en Alemania, su país de origen, ha regresado a Buenos Aires, donde espera residir durante este año para seguir sus estudios en la Universidad del Salvador.

Xenia Prilepskaya reside en Moscú, es periodista, experimentada viajera y quiso conocer nuestro país y comprobar que el esperanto funciona. Para ello emprendió un viaje por Latinoamérica. Llegó a Buenos Aires en el mes de enero.

Albeirice da Rocha y su esposa **Marceli** han generado positivas repercusiones con su visita. En la provincia de Córdoba, el 14 de enero de 2007, el diario *La Voz del Interior* publicó una muy interesante entrevista, que a pesar de contener algunos desafortunados y erróneos conceptos, dio a conocer la visita de los esperantistas y la efectividad del esperanto. También, y tras su paso exitoso por la ciudad de Pres. R. Sáenz Peña, (Chaco), el diario *Primera Linea* (de Resistencia), el 24 de enero de 2007, publicó un extenso artículo bilingüe sobre las



Xenia disfruta de su estadía en Buenos Aires

actividades desarrolladas en esa ciudad y foto de esperantistas en la plaza del Vaticano. Luego, el 28 de enero, volvió a publicar un interesante comentario sobre la actual vigencia del esperanto en Argentina y el mundo, y foto del Prof. Albeirice en el Ce. Cu. Id. (pág. 9)

"La mejor Solución"

La gaceta *Heroldo de Esperanto*, en su N° 16/2006 publicó un comentario sobre la obra de teatro de Hernán Morán *La Mejor Solución*. Recordemos que los protagonistas de esta obra, presentada el año pasado en Buenos Aires, luego de atravesar serias dificultades económicas, encuentran la solución en el idioma esperanto. El autor de la obra relató que su contacto con el esperanto se remonta a su infancia, cuando disfrutaba de los artículos sobre la lengua universal en la revista infantil *Anteojito*.

(Continúa en pág. 15)

El fenómeno llamado Movimiento Esperantista

Ocasionalmente escuchamos estas preguntas: ¿Qué objetivos persigue un esperantista en sus campañas de difusión y actividades relacionadas al esperanto? ¿Por qué el movimiento que difunde la Lengua Internacional algunas veces experimenta problemas internos de carácter organizativo al desarrollar sus tareas? ¿Qué opina Ud. al respecto?

Recientemente alguien me planteó algo similar al respecto, desde su óptica de observador, sobre el Movimiento Esperantista Argentino.

Creo que habría que comenzar siendo positivos en este tema. Todo suma, y todos, por lo menos la mayoría, efectuamos tareas desde nuestro más sincero anhelo a favor de la “interna idea” del esperanto, a saber: “posibilitar una comunicación igualitaria entre los seres humanos en un pie de igualdad y fraternidad”. Sin embargo, es posible notar que el movimiento esperantista presenta diversas facetas, diferentes maneras de accionar y algunas veces un poco dispares unas de otras.

Cuando yo conocí por primera vez el esperanto en el año 1988, pensé que al movimiento esperantista le faltaban unidad y/o coherencia organizativa, pues me dió la sensación de que cada esperantista hacia lo que mejor le parecía. Luego, con el paso del tiempo, comprendí que no era tan así, pues en realidad, el esperanto es un idioma, cuyo creador legara a la humanidad, y por ende es de todos y es de nadie. Se trata pues, de una “herramienta” que cada interesado utiliza de las más diversas maneras y eso no necesariamente significa desentendimiento sino simplemente distintas tareas con un mismo objetivo.

Por supuesto, también es cierto que muchas veces los seres humanos cometemos el error de ser un poco “individualistas”. Nos cuesta trabajar en unidad. Queremos tener “nuestra propia escuela”, como dice el refrán: “cada maestrillo con su librillo” y nos gusta sobresalir del resto,... y nos olvidamos que el “movimiento” está formado por todo el conjunto de personas que lo integran, sean estas intelectuales, profesionales o aficionados, jóvenes o ancianos. El trabajo debe ser en conjunto y por lo tanto en coordinación, en armonía y constructivo.

Analicemos quiénes se interesan por el esperanto.

Los que

- aprenden esperanto sólo porque les interesa la lingüística, y por lo general son profesores y saben varios idiomas y se dedican mayormente o exclusivamente a la enseñanza;

- les interesa la comunicación con diversas culturas y prefieren una lengua sencilla, además de las ya tradicionales como el inglés, francés, alemán, portugués, etc.;

- quieren viajar, hacer turismo, asistir a congresos y encuentros, y ven en el esperanto una forma de conectarse con las personas en los lugares que visitan, y de paso obtienen alojamiento gratuito a través del *Pasporta Servo*;

- son escritores o les gusta escribir y el esperanto posibilita que sus poemas, novelas y/o libros trasciendan las fronteras del propio país;

- cultivan el arte de la música y el esperanto les hace posible expresarse en una lengua que llegará hasta los más lejanos confines de la Tierra (pág. 5)

Asembleo de Bonaera E-Asocio

En la sidejo de strato Paraguay, Buenos Aires, la 27-an de decembro 2006, okazis Asembleo de Bonaera Esperanto-Asocio.

Kun partopreno de 16 esperantistoj. Estis renovigita la estraro kaj elektiĝis jena provizora Komitato:

Prezidanto:

Alcides P. Wentinck

Sekretario:

Jorge Cabrera

Kasisto:

Elena Morteo



Partoprenantoj de la Asembleo de Bonaera E-Asocio



– no saben muy bien por qué están aprendiendo una nueva lengua, pero poco a poco y con el tiempo, descubren su verdadera motivación y terminan efectuando muchas actividades que son capaces de hacer pero que nunca soñaron realizar, por ejemplo: ser profesor de un idioma, fundador de un club, secretario, presidente, bibliotecario/archivador, guía de turismo, periodista, redactor, organizador de eventos, etc. y algunas veces esto despierta cierta tendencia a considerarse superiores a otros o a querer trabajar en forma personal, individual, y de alguna manera un tanto “cerrada”.

Sin embargo, al repasar la extensa lista de los individuos, clubes, círculos y asociaciones que difundieron/difunden y apoyaron/apoyan al esperanto a lo largo de su historia, encontramos una gran variedad de fervientes promotores, difusores, tales como humanis-

tas; laboristas; idealistas; artistas; socialistas; lingüistas; espiritistas; minorías diversas que buscan ambientes donde no sean discriminados; deportistas; ecologistas, etc.

En el *Jarlibro* de UEA aparecen diversas asociaciones (sólo las que están en contacto y/o relación directa con UEA) y son más de 60. Por eso también, en una liga nacional, que une o liga a los cultores del esperanto, como es el caso de nuestra Liga Argentina de Esperanto, pueden y deben funcionar/trabajar clubes e individuos con las más diversas expectativas, mientras todo eso sume o aporte resultados positivos. El conjunto de todo es un movimiento pluralista, que por supuesto, en muchas ocasiones cuesta armonizar, pero con una mínima cuota de comprensión y tolerancia se consiguen exitosos logros y ciertamente estos se aprecian con el paso del tiempo.

R. D.

Dank`al Pasporta Servo

Kiel kunfondinto de **Argent-EJO** en 1964 kaj de **Pasporta Servo** en 1966, mi multe ĝojis pro la rakonto (informo) de vizito al Afriko fare de argentinano Francisco Zilli.

Ni kunlaboru por (kaj per) Esperanto kaj por Pasporta Servo. Ni kreskigu Afrikon kaj helpu afrikanojn por la Afrika Unuiĝo kiun Mandela deziris. Eĉ se Pasporta Servo estus la sola utilo de Esperanto, eĉ tiel Esperanto lernindus.

*Rubén Feldman González
Kun-fondinto de Pasporta Servo*

Francisco en Kongolo

“Mi estas Francisco Zilli, 32-jara, kaj loĝas en urbo Cipolletti, provinco Río Negro, kiu troviĝas apud urbo Neuquén, en la norda parto de Patagonio, Argentino.

Mi apartenas al **Neŭkena Esperanto-Rondo**, al **Argentina Esperanto-Ligo** kaj al **Argent-EJO** (Argentina Esperantista Junulara Organizo). Mi estas elektronikisto de petrol-entrepreno en Angolo kaj mi laboras sur mara petrol-ŝipo en okcidenta Afriko.

Sed mi nun skribas pri mia renkonto kun samideanoj de EAKO (Esperanta Asocio en Kongolo) en la urbo Pointe Noire, Kongolo, Afriko, kaj dediĉas al mia familio, kiu multe helpas min en tiu malfacila laborplano; al ĉiuj gastigantoj de Pasporta Servo, kiuj kredas ĵe amikeco; al Esperanto, kiu faras ĉiajn renkontojn eblaj.

Mia vojaĝo komenĉis la 25-an de oktobro 2006, en mia urbo, kiam mi devis preni aviadilon cele al Angolo por laborperiodo.

La petrol-ŝipo kie mi laboras estis en la ŝiphaveno de Doualo, Kamerunio, do, por iri tien mi devis preni aviadilon ekde Angolo kaj preterpasi al flug-haveno de Pointe Noire, Kongolo kie mi ne povis preni aviadilon pro ia komklikaĵo. Pro tio mi devis resti en hotelo en la urbo, sed mi ne povis viziti ĝin ĉar mi estas blankulo kaj promeni sola tra la urbo ne estis facila por mi.

Mi sendis ret-mesaĝon al samideano Renato Corsetti en Italio, ĉar mi ne kunportis la Jarlibron, kiu donis al mi mia instruisto s-ro Rubén Sánchez, en Neuquén, do Renato sendis al mi la informojn.

Do, mi serĉis samideanojn de la urbo en TTT-ejo pri Pasporta Servo, kaj mi trovis iliajn nomojn kaj mi decidis telefoni ilin.

Tagmeze de la 28-an de oktobro 2006 mi lasis mesaĝon en la poŝt-telefono de s-ro Loubaki. Vespere, li kaj du amikoj vizitis min en la hotelo.

Kun granda surprizo ili vidis min, tiun altan blankulon, kiu parolas Esperanton. Ili diris, ke mi estas la unua blank-eksterlandulo, kiu vizitas ilin kaj tion mi tre ŝatis.

En tiu vespero ni parolis pri multaj aferoj kaj ni decidis renkontiĝi en la hotelo dum venonta tago por promeni tra la urbo kaj koni la aŭtentikan kongolan vivon.

Dimanĉe la 29-an matene mi kaj s-ro Loubaki prenis taksion kaj veturigis min tra multaj kvartaloj de la urbo, bedaŭrinde mi ne povis preni fotojn en la urbo ĉar tio estas "stranga afero" por la malpacema homoj en tiu urbo.

Ni vizitis la lernejon kie s-ro Loubaki instruas la anglan kaj Esperantan lingvojn. En tiu okazo mi faris kopion pri informoj de la Esperanta en KD, kiun mi kunportas en mia portebla komputilo ĉar tio estas tre utila al li ĉar ili ne havas retaliron en tiu loko. Ankaŭ en la lernejo mi renkontiĝis kun alia instruisto pri angla lingvo, kiu estas amiko el s-ro Loubaki kaj kiu nun komencis lerni Esperanton. Bedaŭrinde mi ne tre bone memoras la nomon de tiu sinjoro. Mi tre ĝojis montri al li, ke Esperanto funkcias tre bone kaj estas pli facila ol la angla aŭ la franca lingvoj por internacia komunikado. (Mi parolas ilin, sed mi preferis paroli en Esperanto por ekzerci la paroladon).

Poste, preskaŭ tagmeze, ni vizitis la maran flankon en la urbo kun s-ro Samba. La vetero estis pluva kaj venta.

Tagmeze ni manĝis rapide ĉar la vetero ne kunlaboris kaj ni emis viziti la kamparon, kie s-ro Loubaki loĝas kaj laboras. Poste, ni vojaĝis al la kamparo ekstere de la urbo kaj unue ni vizitis la hejmon de s-ro Loubaki, kie li havas multajn E-materialojn.

Mi tre ŝatis tiun malgrandan sed karan sidejon. Li montris kaj montris multajn materialojn kaj aferojn, kiujn li faris por disvastigi Esperanton en lia urbo. Tie mi ankaŭ eksciis, ke lia katino nomiĝas Amikino.

Poste ni promenis ĝis lia kamparo, de kie li prenis multajn legomojn... Sed, PLUVEGIS!!!

Kiam li ne estas en lia lernejo li laboras en lia kamparo!

Kaj, kiel ĉiam, mi prenis iom da tero en saketo, ĉar mi kolektas teron el ĉiuj landoj kiuj mi vizitas, kaj en malgranda botelo en mia hejmo, kiel hobio.

Eden kaj Samba ricevis donacetojn kiuj mi kunportis el Argentino por doni al speciala amiko, kiun mi povus trovi dum la laborvojaĝo. SED PLUVEGIS tro multe kaj ni devis iri al hotelo.

Konkludo:

Do, jen mia grandega aventuro en la Kongola lando, malsimila de kiel mi vivas en Argentino, sed aminda, vere. Mi renkontiĝis, dank' al Pasporta Servo, kun afablaj kaj karaj samideanoj, kiujn mi ne facile forgesos. Mi tre kore dankas ilin pro ĉio. Mi kredas, ke ne je la lasta fojo preterpasis tiun urbon, do, ni renkontiĝos iam poste,... neniu scias!''

Francisco Zilli, Cipolletti, Río Negro

Libroservo

Para obtener material impreso en y/o sobre esperanto consulte al Libroservo de AEL.

Visite nuestra página Web, o escriba a:

Mario J. Miranda
Paraguay 2357

C1121ABK Capital Federal
Buenos Aires

<eo_1954@yahoo.com.ar>

Ĉu vi jam abonis vian AEL-kotizon por 2007?

(Vidu p. 15)

Brazilano el Rio-de-Janeiro en Chaco

Pere de interreto ni sciis pri vizito de Fabio Lima da Silva, 35-jara, el Río de Janeiro, al nia urbo Pres. Roque Sáenz Peña, Chaco.

Post interkonsento, Fabio alvenis la 2-an de decembro 2006, je la 10h00 ATM. Lia gastigo estis ebla dank' al gastiganto Rubén Diaconu Tkachenco de Pasporta Servo.

Sabaton nokte, post rapida rigardo al la urbo fare de la vizitantoj, okazis renkontiĝo “Esperanto – portugala” ĉe Centro Cultural de Idiomas Jorge Amado, kaj malgraŭ la pluvo, SEK-anoj kaj simpa-tiantoj de Esperanto ĉeestis por kunfratiga vespermanĝo.

Fabio kapablis paroli, depende de la lingvoscio de la ĉeestantoj, jen Esperante jen portugale jen hispane, pri la Esperantan kaj brazilan kulturoj, ankaŭ pri lia profesio — li estas inĝeniero pri matalurgio kaj studas pri Polimeraj Sciencoj ĉe Federacia Universitato de Río de Janeiro.

London matene Rubén akompanis Fabion viziti la Zoologian Parkon kaj Regionan Reservejon (la 4an plej gravan en el lando) por konigi al li niajn flauŝon kaj faŭnon.

Post tagmeze, oni vizitis turisman lokon “Complejo Termal” por koni kuracigajn termajn akvojn kaj la Municipa Turisma Oficejo. Fabio ankaŭ ricevis donace, provincan blazon-ŝildon



*Kunfratiga renkontiĝo ĉe Ce.Cu.Id.
Fabio, la unua de maldekstre.*

sur papero, kiel memoraĵon kaj por lia kolekto.

Sekve ni vizitis la Fakultaton pri Agroindustrioj, kie Fabio konis la bibliotekon, la ceteran konstruaĵon kaj profitis la okazon por demandi ĉe laboratorio pri esplorado de lokaj vegetaloj – kuracaj kaj nutraj–.

Post vespermanĝo ĉe familio Stacul ni adiaŭis Fabion busstaci-dome, ĉar marde li devis viziti urbojn Santiago del Estero kaj Córdoba.

Rezulte de lia vizito al nia urbo oni interŝanĝis E-materialojn kaj promesis daŭrigi la kontakton kun Fabio kaj kun Kultura Kooperativo por Esperantistoj de Río de Janeiro, kies membro li estas.

**Raportis: Tony Stacul
Saenzpenja Esperanto-Klubo**

Brazilaj geesperantistoj diskonigas Esperanton

Prof. Pedro Albeirice da Rocha kaj lia edzino Marceli Helfenstein de Albeirice da Rocha vizitis Saenzpenjon, (16-31 jan 2007).



Prof. Pedro Albeirice da Rocha prelegas ĉe Ce. Cu. Id.

Geedzoj Albeirice da Rocha loĝas en urbo Araguaína, (130.000 loĝantoj), ŝtato de **Tocantins**, pli ol 1000km norde de Braziljo, tre proksime al la Amazonia regiono. Pedro estas doktoro pri literaturo kaj profesoro en la Federacia Universitato de Tocantins. Marceli sekvas universitatan kurson pri flegado. Ili rete kontaktis UEA-delegiton Rubén Diaconu Tkachenco.

Ili eniris nian landon fine de decembro tra provinco Misiones (landlima kun Brazilo, pli ol 1000km norde de Bonaero) kaj, pere de la nordorienta “mezopotamia” trajno Gran Capitán, atingis Bonaeron, kie ili gastis ĉe esperantistoj. De tie ili vojaĝis al Kordobo, landomeze, kaj poste ili revenis nordorienten, al Chaco. Dank’ al Pasporta Servo ili restis en nia urbo dum unu semajno. Saenzpenja Esperanto-Klubo (SEK) profitis ilian viziton por organizi diversajn aktivajn cele al la disvastigo de Esperanto en la urbo kaj

samtempe klopodis agrabligi la restadon de Pedro kaj Marceli.

Merkredon la 16-an, organizite de Centro Cultural de Idiomas Jorge Amado (Ce. Cu. Id.) sub la aŭspicio de SEK, prof. Albeirice prelegis portugallingve pri brazila literaturo, ĉeeste de ĉ. 40 homoj aktivaj en la lingvo-sferoj (angla, portugala kaj Esperanto). La aranĝo finiĝis per vino honore al la gastoj. Inter la vizititaĵoj ni urbaj ni mencias la urban muzeon, terman komplekson, zoon, someran klubon de la hispana kolektiveco kaj la adventistajn preĝejon kaj sanatorion Loma Linda, lokoj kie Esperanto estis disvastigita kaj bone akceptita, ĉefa motivo de la vizito de Pedro kaj Marceli. Krome, ili vizitis diversajn libro-vendejojn, kie Pedro akiris diversajn literaturaĵojn en la hispana.

E-istoj, SEK-anoj kaj E-simpatiantoj akceptis la gastojn iliahejme en frateca etoso. Ni mencias Alicia Aranda,

Yolanda Quintana, Tóny Stacul kaj Roberto Fogar. Merkredon matene Pedro, Marceli kaj Rubén vizitis la radio-studiojn de LT16 Radio Sáenz Peña kaj FM Centro kaj estis intervjuitaj por la multimedia entrepreno *Multimedios Informa* de kablotelevida kompanio STC.

Lundon la 22-an Pedro kaj Marceli adiaŭis cele al Resistencia, nia provinca ĉefurbo, kaj poste, transpasinte la ponton super rivero Paraná, konatiĝis kun la ĉefurbo de la najbara provinco Corrientes. Sekve ili daŭrigis sian vojaĝon al Formosa, Asunciono kaj, fine, revenis al Tocantins.

Prof. Albeirice da Rocha deklaris esti favore impresita pri ilia sperto en nia urbo, kie ili ĝuis fratecan etoson kaj ĝenerale trovis la loĝantaron varmkora kaj amikema.

• *Fotis: Marceli de Albeirice da Rocha*

• **SEK-Bulteno n-ro 21, 2007-1**

Pri la E-Semiaro en Wanda

Komence de novembro 2006, organizita de Agnieszka Machota, okazis en urbo Wanda, tre sukcesa Esperanta

Seminario pri Pollando kaj la pola kulturo. Trideko da partoprenantoj el Argentino, Urugvajo kaj Brazilo ĉeestis kaj profitis ĝin. Krom la jam prezentita raporto en nia antaŭa numero, nun ni informas pri la "Deklaracio de Wanda".

Deklaracio de Wanda [vanda]

Ni, la partoprenantoj de la Internacia Seminario Esperantista en Wanda, Misiones, de la 2-a / 5-a de novembro 2006, pri "Pollando: la patrujo de Ludoviko Zamenhof. Tra la spuroj de la pola emigracio" kaj memore al la pola

enmigrintoj en Wanda, subskribas tiun ĉi Deklaracion:

➤ Ni firme aliĝas al la celo de la Esperanto-movado pri la integriĝo de kulturoj fare de neŭtrala lingvo Esperanto, aferoj pri kio ni plue lernis dum la Seminario.

➤ Ni akordas, ke estas grave por esperantistoj koni la historion kaj kulturon de la pola popolo al kiu apartenis Ludoviko L. Zamenhof, kreinto de Esperanto.

➤ Ni feliĉe rekonas la agadon de la Vandana enmigrintoj kaj iliaj posteuloj refere al la reviviĝo de la pola lingvo kaj kulturo, pere de Esperanto kiel internacia neŭtrala lingvo.

➤ Ni deziras kaj proponas pliiĝi la kontaktojn inter esperantistoj de niaj proksimaj landoj en Sudameriko, (Argentino, Brazilo, Paragvajo kaj Urugvajo), por labori en la konstruado de vera komunumo de personoj margene de la "merkosuda" unio ekonomia kaj komerca, favorante novajn kunvenojn inter esperantistoj.

➤ Ni restas tre dankemaj al la komitato de la Pola Societo de Wanda, kiu fratemaj kaj sindoneme gastigis nin dum la seminario, helpe de la loka municipa registaro kaj la ambasado de Pollando en Argentino

Kaj finfine ni volas gratuli la organizantojn, ĉefe Agnieszka Machota, pro la sukceso de tiu ĉi unua Seminario, kiu jam starigas Esperanto-rondon en Wanda, kaj proponas re-okazigi tiajn ĉi kunvenojn.

Forpaso

S-ro **Augusto Fuentes**, en Córdoba, esperantisto, edzo de s-anino Heloísa Ricco.

S-ino **Sofia Pelliza**, en Neuquén, edzino de s-ano Rodolfo Calógero.

Niajn kondolencojn al iliaj familioj.

Legio de Bona Volo en Brazilo

Legio de Bona Volo (LBV), institucio fondita en Brazilo de Alziro Zarur (1914-1979), kompletigis 57 jarojn la 1-an de januaro 2007. Unu el ĝiaj originalaj iniciatoj estas la disvastigado de Kompleta kaj Senlima Ekumenismo, favorante kongruigon de la tuta homa kaj spiritan konojn en potenca forton je la servo de popoloj.

LBV ankaŭ klopodas, ekde sia naskiĝo, por la plej disvastigado de la internacia lingvo Esperanto, altvalora ilo por la interfratiĝo de la popoloj, laŭ la konsidero, ke *LBV estas la Esperanto de la religioj, samkiel Esperanto estas la LBV de lingvoj.*

En- kaj eksterlanda kresko de LBV okazas ĉefe pro la agemo de ĝia Direktoro-Prezidanto, José de Paiva Netto, kiu, kun la helpo de la socio, modernigadas kaj firmigadas la institucion ekde 1979, kiam li prenis ties gvidadon. Li kreskigis ĝin je proksimume 15000%; kaj transformis ĝin en unu el la plej grandajn manifestiĝojn de humanismo kaj socia Solidareco.

Ekde la jaro 1994 LBV kunlaboras kun la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UN); la Institucio interrilatas kun la

Departemento pri Publikaj Informadoj (DPI) kaj havas statuson de ĝeneralaj konsultoj en la Konsilo pri Ekonomika kaj Socia Disvolviĝo (Ecosoc). Krom tio, ke ili atestas la gravecon de tiu internacia laboro, tiuj konstatoj donas al LBV la rajton prezenti proponojn kaj partopreni, per voĉdonpovo, en konferencoj kaj renkontiĝoj organizitaj de Unuiĝintaj Nacioj pri ĉiuj temoj, kiuj interesas Organizaĵon.

La rezulto de la klopodo de miloj da volontuloj, kontribuantoj kaj kunlaborantoj, sin montras per la miriga bilanco pri asistoj de la Organizo. En 2005 Legio de Bona Volo plenumis pli ol 4 milionojn da asistoj per pluraj socio-educakaj programoj en Brazilo. Temas pri lernejoj por elementa edukado, ekde bebaĝo ĝis mezgrada lernejo, hejmoj por infanoj, adoleskantoj kaj maljunuloj; Komunumaj kaj Edukaj Centroj, kun pluraj kursoj pri profesia eduko kaj kapabligo; kaj urĝaj programoj pri kontraŭbatalo de malsato kaj mizero; sociedukaj kampanjoj, kiuj indigas la vivon. Tiu laboro trapasas limojn: ili trovas grundon ankaŭ en Argentino, Paragvajo, Urugvajo, Bolivio, Portugalio kaj en Usono, kaj kalkulas je korespondantoj en la tuta mondo.

Por ke tiu grava socia, spirita kaj ekumena agado estu pli konata ankaŭ de la Monda Esperantistaro, ni, el Legio de Bona Volo, invitas Vin, kara samideano(in)o, eniri la TTT-ejon de la Institucio, kies adreso estas www.bonavolo.com.

*Maria Aparecida da Silva
Respondeculino de la Departemento
pri Esperanto de LBV*

TAKE

La Tut-Amerika Kongreso de Esperanto ne plu okazos en 2007. La aranĝo en Kalgario, Kanado, estas nuligita. Transprenis ĝin la Esperanto-Societo Kebekia, kiu okazigos ĝin en **Montrealo** en julio 2008.

Nekutima telefonvoko

Ergoto de Bonaero

Vekis min telefonsonorado; mi sarkis pri kiu komponis la numeron de mia telefono, ellitiĝis kaj prenis la ricevilon.

- Estas la tria horo matene -iu diris.

- Mi tion scias idioto! -mi kriis- Kiu estas tiel sprita por telefoni je ĉi horo?

- Mi -respondis la ulo-, sed idioto mi ne estas. Idioto mi estus se mi telefonus al vi je la sepa, por diri ke je tiu horo estas la tria.

- Ĉu mi havas la rajton sciiĉi pri kia blago temas.

- Mi povas aserti ke ne temas pri blago -diris la ulo- Mi diris al vi ke estas la tria matene, kaj tiel estas.

- Tute ne interesas min ke estas la tria! Mi ne pensas ellitiĝi!

- Ĉu vi ne pensas ellitiĝi? Ĉu vi do parolas en la lito?

- Mi ne parolas en la lito! Mi parolas en la televidĉambro, kaj mi devis ellitiĝi por respondi vian stultan vokon!

- Vi -milde diris la ulo- ĵus diris ke vi ne pensas ellitiĝi je ĉi horo. Tamen vi forlasis la liton. Ĉu vi povas klarigi tion?

-Nu, fakte -mi grumblis iom konfuzite-, mi ne pensis ellitiĝi. Sed, kial vi vokas je la tria matene por diri al mi ke estas la tria?

- Ĉu vi pretendas ke mi voku tagmeze por diri ke estas la tria? Ĉu vi volas transformi min en hipokritan ŝajnigeman friponon? Sciu ke mi estas kaj daŭre estos ĝismorte, homo honesta, serioza kaj verama,

- Mi pensas transformi neniun -mi flustris-, kaj mi ne dubas pri via honesteco. Kaj ĉar mi povis taksi ke vi estas afabla kaj ĝentila homo, mi estonte konsideros vin kiel bonan amikon. Kaj vi ne neos peton al amiko, ĉu ne?

- Mi akceptas vian amikecon. Kaj kompreneble, mi neniam neas peton al amiko!

- Bone. Jen mia peto, neniam plu, bonvolu kompreni ĝin, neniam plu telefonvoku min je la tria matene.

- Neniam plu mi telefonvokos vin je la tria matene! -diris la ulo- Mi ĵuras pro la honoro.

Kaj post diversaj asertoj de amikeco, li finis la interparolon. Mi reiris en la liton kaj profunde dormiĝis. Sed vekis min la telefonsonorilo. Mi leviĝis, iris en la televidĉambron, levis la ricevilon, kaj aŭdis la voĉon de la sama ulo kiu diris:

- Estas la kvara!.-

* *Ergoto de Bonaero* estas la plumnomo de Adam Hrinkiewicz. Li naskiĝis en Buenos Aires en la jaro 1931. Ergoto lernis Esperanton en 1959 kaj poste verkis diversajn librojn Esperante kaj hispane. Li ankaŭ laboris por la instruado de Esperanto. Li kreis la kursojn *¿Habla Usted Esperanto?* kaj *Curso Relámpago de Esperanto* kaj diversajn ekzercoj por plibonigi la lingvon. Li verkis tre gravan vortaron *Laŭtema Vortaro*, uzante la anglan, hispanan, francan kaj Internacian lingvojn en la sama vortaro.

Lia agado estas postspurebla en revuoj kiel *Karuselo*, *The British Esperantist* kaj *La Tornistro*. En 1970 li gajnis la premion "Nova Talento" en la Belartaj Konkurso de UEA. Inter liaj libroj menciendas *Bonhumora Injektilo*; *Originala Romanaro en Esperanto*, *Ekflorado ĉe Plata Rivero*; la *Ergoto de Ergoto*; *Kantetoj Karnaval-paradaj*; *Ergotado*, *Versumado*; *Kalejdoskopa Varieteo*; *Tamburelo* kaj *Cenefas y Pavesas*.

Sendita de Carlos Devizia, Buenos Aires

Ĉu vi memoras?

Ĉu vi memoras kiam
la vortoj nur
estis pensoj?

Mi memoras kiam la
emo pri penso
estis rekta vojo.
Kiam la pripenso
estis frukto de la tagoj.

Ĉu vi memoras kiam
la penso nur
estis speco
de grupa telepatio?

Jes, ĉar la Bono estis
tiu kiu havis pli grandan
pezon. Kaj la Esto
sinofervis pro atingi
aŭtentan sincerecon.

Hodiaŭ, mi ne volus
memori pri tiu tago...
Kiam iom post iom
naskiĝis la vortoj.
Tiu, kiuj nenion diras;
tiu, kiuj provas malbonsortojn,
friponajn ludetojn,
kaj proprajn motivojn
kaj duoblajn sencojn.

Kiu povus rehavi
la ekzercon de la frazo?

Kiu povus repensi kaj
krei veran lingvon?

Kiu... trovi la
sesan sencon tre kaŝan
aŭ eble neekzistantan ĉe
la inertaj mensoj?

Plie, kiu kredus ke la
vortoj difinas vere
ĉion kion ni sentas?

Ĉiodepende, depende
de ĉiuj, de ĉiu.

Mi memoras... kiam ĉio
subite
rekomencis...

Ĉu vi memoras pri la nova revo
de la Homo...?

Dario Aristides Molina "Píndaro"

Biografía del autor

Dario Aristides Molina, "Píndaro". Poeta y escritor argentino nacido el 16 febr. 1982, en San Luis. Su intensa actividad en el "Mundo de las Artes" da lugar un día de 1998. De aquí en adelante comenzó a participar en congresos y encuentros de poetas y escritores de carácter nacional e internacional en distintas ciudades del país. Fué invitado de honor – para leer sus poemas – en distintas estaciones de radios con cobertura local y nacional.

Sus obras poéticas y narrativas han sido difundidas por todos los medios existentes de difusión masiva; paralelamente publicó en distintas antologías como colaborador y como finalista en distintos concursos literarios. Próximamente lanzará su primer libro titulado *Entre el Cielo y el Mar*.

Es el creador y fundador del centro literario Hunab- Kú, con sede matriz en la ciudad de San Luis.

E-mail: pindarodam@hotmail.com

Himno al la Vivo

“*Patrino Tereza*”

- La Vivo estas unika ŝanco
–prenu ĝin serioze
- La Vivo estas beleco
– admiru ĝin
- La Vivo estas feliĉo
– gustumu ĝin
- La Vivo estas revo – realigu ĝin
- La Vivo estas defio
– akceptu ĝin
- La Vivo estas devo
– plenumu ĝin
- La Vivo estas ludo – ludu ĝin
- La Vivo estas valoro – gardu ĝin
- La Vivo estas havaĵo – uzu ĝin
- La Vivo estas amo
– transdonu vin al ĝi
- La Vivo estas sekreto
– solvu ĝin
- La Vivo estas promeso
– plenumu ĝin
- La Vivo estas malĝojo
– venku ĝin
- La Vivo estas kanto – kantu ĝin
- La Vivo estas batalo
– finlaktu ĝin
- La Vivo estas aventuro
– entreprenu ĝin
- La Vivo estas rekompenco
–meritu ĝin
- La Vivo estas vivo – vivu ĝin!

El Bazar n-ro 4 (39) 2006

Internacie

La nombro de aliĝintoj al Jokohamo superis 1300

Ĝis la 29-a de januaro 1312 kongresanoj el 51 landoj aliĝis al la 92-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Jokohamo de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto. Sekve la Jokohama UK jam superis la definitivajn nombrojn de aliĝintoj de du ekstereŭropaj UK-oj de la lastaj dek jaroj: Adelajdo en 1997 (1224) kaj Tel-Avivo en 2000 (1212), dum du aliaj UK-oj ankoraŭ superas Jokohamon en la statistiko: Fortalezo en 2002 (1484) kaj Pekino en 2004 (2031). La unua japana UK en Tokio en 1965 arigis 1710 aliĝintojn. Ĝis nun la nombra evoluo de la Jokohama UK preskaŭ precize sekvas tiun de la UK en Florenco. Je la sama dato pasintjare la Florenca UK havis 1305 aliĝintojn el 51 landoj, kaj ĝia fina nombro estis 2209 kongresanoj el 62 landoj.

Pli ol duono, 766, de la aliĝintoj venas el la gastigonta lando. Ĝiaj najbaroj Korea Respubliko kaj Ĉinio liveris po 68 kaj 29 aliĝintojn. La aliaj landoj kun minimume 10 aliĝintoj ĝis nun estas Germanio (50), Francio (49), Litovio (34), Italio kaj Nederlando (po 25), Pollando (22), Britio (18), Svedio (17), Brazilo (16), Usono (14), Kroatio (13), Belgio (12), Bulgario, Ĉeĥio kaj Svislando (po 11), Aŭstralio, Hungario kaj Rusio (po 10).

Gazetaraj Komunikoj de UEA n-ro 253

Agradecimientos

AEL agradece la colaboraci3n de: NN,
A. Valle [Buenos Aires],

(Viene de pág. 3)

El esperanto, más frecuente en los medios

Los esperantistas han estado siempre atentos a que los medios de comunicación hagan referencia al idioma internacional, su uso y su difusión.

Lamentablemente ocurre con frecuencia, que lo que se escribe sobre el esperanto es inexacto, lo que lleva a muchos a reaccionar enviando protestas y aclaraciones y señala la **necesidad de informar más ampliamente** a dichos medios.

Sin embargo, estamos de acuerdo que la lengua internacional es mencionada con mayor frecuencia en los medios de comunicación en todo el mundo. Bástenos señalar algunos datos a partir del reciente mes de enero.

- El 22 de enero, por primera vez apareció un informe sobre el esperanto con entrevista al Dr. Renato Corsetti presidente de UEA, en el prestigioso diario japonés *Asahi Shimbun*, que edita ocho millones de ejemplares diarios. El periódico hizo referencia a la celebración del 92º Congreso Universal de Esperanto que tendrá lugar en Yokohama, en el próximo mes de agosto.

- La película rusa de ciencia ficción *Viaje Cósmico* ahora está en internet, también subtitulada en esperanto. Cada vez son más las películas que pueden verse en la lengua internacional.

- El lunes 21, el Canal 12 de televisión de Córdoba, en un programa informativo de la mañana, invitó al Ing. Jorge Bidoni, a quien entrevistó durante quince minutos, permitiéndole explayarse libremente sobre el Esperanto, sus cursos, su actualidad en internet, etc.

(continúa en la contratapa) =>

A n u n c i o s

AEL necesita su adhesión

Si Ud desea abonar su adhesión o colaborar con las tareas de AEL envíe su donación mediante depósito en Banco Francés, [sin costo], cuenta N° 147-005789/3, a nombre de:
Alcides Pieter Wentinck
DNI 93.709.394
Calle Libertad 3226
B1602DJD Florida, Vicente López
Buenos Aires
y luego indefectiblemente informe sobre dicha operación a:
wanelec@sion.com

Si desea colaborar con la edición y distribución de la revista **Argentina E-Vento** también puede enviar su contribución mediante el “Banco Patagonia”, depositando su aporte en “Caja de Ahorro” suc. 110, Sáenz Peña, cuenta N° 394101439, del Sr. Oscar C. Monge, [sólo se descontará \$6,50 como gasto bancario por depósito]. Rogamos siempre informar sobre su operación a esta redacción:
rubendiaconu@yahoo.com.ar.

Radio-elsendo

Aŭskultu la radio-elsendon
“Esperanza-urbo al Mondo” ekde
la 2-a de marto 2007, ĉiusemajne,
je la 18h15 (09h15 PM UTC),
en FM 107.1

“Radio Aarón Castellanos”.

www.fmaaroncastellanos.galeon.com

**Zorge de Abel Weiner
Esperanza, Santa Fe**

(continuación de pág. 15)

• En Bolivia, el diario “La Patria” publicó una amplia referencia bibliográfica sobre el libro del Dr. José R. Arze “Malgranda Bolivia Antologio”, que recopila también textos en esperanto traducidos del Quechua y Aymara.

Finalmente, debemos destacar que en Buenos Aires, un empresario gastronómico, tiene un lujoso restaurante de comida internacional llamado “Esperanto”, al que ha agregado una “Disco”, local bailable, en Palermo y otro en Mar del Plata, que son frecuentados por turistas y personajes de la farándula, por lo que son frecuentemente mencionados en diarios y revistas.

Igualmente vale la pena citar las discotiendas “Esperanto” de Caracas, Venezuela, mencionadas diariamente en las noticias del “Google”; la “Boutique Esperanto” en un Shopping de la ciudad de Córdoba; el conjunto de Rock “Esperanto” de Cochabamba, el coro “Esperanto” de Posadas en Misiones, “The Esperantos” de Michigan (USA), y el grupo punk “Esperanto” de Nueva York.

Mientras tanto en Madrid la banda “Le Punk” canta desesperadamente y en Esperanto su canción principal “La lukto estas perdita!”

Sin embargo como esperantistas se piensa que todavía no está dicha la última palabra y más allá de la “utopía” de imponer una lengua internacional, existe la realidad de la necesidad de una lengua común neutral, multicultural y multiétnica.

Por lo mismo un periódico de Cuba se pregunta hoy: “El Esperanto, ¿una lengua muerta?”, para concluir que: “**¡El Esperanto está hoy más vivo que nunca!**”

Y, como broche de oro para nosotros, aquí y ahora, nos ha llegado al comité de AEL una solicitud del Ministerio Nacional de Educación, para utilizar el libro *¿Sabe Usted Esperanto?*, de Jorge Hess, en el ámbito de la política multilingüe del Ministerio, según la nueva ley de Educación, que hace obligatorio el estudio de una segunda lengua a opción del estudiante.

www.esperanto.org.ar

Redakcio de Argentina Esperanto-Ligo: Calles 119 y 122, AR-H3700FTT Pres. R. Sáenz Peña, Argentino

Sr/a :

